

Legendoj kaj tradicioj de la kongreslando

Miaopinie por ekkompreni alilandanojn oni bezonas ekkoni ilian historion, kulturon, tradiciojn, lingvon ktp. Tial kun intereso mi esploras tiujn aferojn, aŭskultas prelegojn kaj legas librojn pri la vizitata lando, lernas lingvon parolatan tie, ĝuas koncertojn de la loka muziko, admiras lokajn arkitekturon kaj arton, vojaĝas en diversajn lokojn enlande. Mi ankaŭ ŝatas ekkoni lokajn legendojn. Ĉi-somere dum la 103-a UK en la vendejoj, restoracioj, turismcentroj kaj aliaj lokoj en Lisbono mi ofte vidis figureton de la koko de Barcelos (port. [Galo de Barcelos](#)) – unu el la plej popularaj folkloraj simboloj de Portugalio. Kun ĝi estas ligita la jena mezepoka legendo: En la urbo Barcelos, situanta en la nuntempa distrikto Braga norde de la lando, oni faris krimon, sed la farinto restis nekonata, kio intensigis la timon de la loĝantoj. Iutage alvenis tien galega pilgrimanto iranta al Santiago-de-Kompostelo, la celo de la Jakoba Vojo, kiu fariĝis la ĉefa suspektinda persono. Malgraŭ la konvinkoj pri sia senkulpeco, la novulo estis malliberigita kaj kondamnita al la morto per pendado. Antaŭ ol la verdikto estis farita, li petis, ke oni konduku lin antaŭ la juĝisto, kiu sendis lin al la morto. Alveninte al la domo de la funkciulo, kiu ĵus okazigis festenon, la galegano denove petegis indulgisan vivon, sed liaj penoj estis vanaj. Do li turnis sin al la ĉeestantaro, anoncante: "Mia senkulpeco estas tiel certa, kiel la fakto, ke la rostita koko kokerikos tuj kiam mi pendos." Konsternigitaj bankedanoj, malgraŭ nekredemo kaj mokridado, ne decidis tuŝi la kokon. Post iom da tempo, kiam la bedaŭrinda pilgrimanto estis pendigata, la birdo subite ekvivis kaj ekkriis laŭte. La juĝisto, kiu ekkomprenis sian eraron, tuj iris al la pendumilo, kie montriĝis, ke difektita ŝnuro ebligis la kondamniton travivi. La galegano, kiun oni liberigis, revenis post jaroj al Barcelos kaj konstruis tie krucon honore al la Benita Virgulino Maria kaj sankta Jakobo, t.n. *Cruzeiro do Senhor do Galo*.

Kaj ĉu vi scias kial en [la blazono de Lisbono](#) troviĝas du korvoj? Laŭ legendo ili estis gardantaj la korpon de sankta Vincento, kiun liaj fidelaj kunuloj kaŝis en la groto, protektante ĝin de sovaĝaj bestoj ĝis la fideluloj povis enterigi lin. Kiam la unua reĝo de Portugalio, Afonso Henriques, ordonis alporti la restaĵojn de la sanktulo al Lisbono, du nigraj korakoj akompanis la ŝipon survoje la tutan vojon de la promontoro *Cabo São Vicente* ĝis la urbo. Kaj ekde tiam gregoj de korvoj gardas la funebran kapelon de tiu ĉi sanktulo. Li estis kristana martiro, persekutata kaj mortigita (malgraŭ torturoj, li ne rezignis pri sia kredo kaj estis krucumita) de la antikvaj Romanoj. Kaj nun li estas sankta patrono de Lisbono, kaj ankaŭ de vinbergardenistoj, vinvendistoj, arbaranoj, lignohakistoj kaj kamparanoj.

Multaj kongresanoj partoprenis ekskursojn al vizitindaj lokoj. Ni venis al la maŭra [Castelo de São Jorge](#) situanta sur unu el la montetoj en la historia centro de Lisbono, la plej malnova urboparto *Alfama*. Proksime al la kastelo mian atenton altiris pordoj bele dekoritaj de diverskoloraj girlandoj kaj multekoloraj flagetoj pendantaj inter domoj ĉe maldikaj stratetoj. Tio estis postsigno de loka festado omaĝe al la sankta Antonio. Stratoj ornamitaj per girlandoj, trinkejoj kun biero kaj sangrio po 1 €, rostitaj sardinoj, orkestroj kaj kantistoj sur ĉiu angulo, kaj amasoj da amuzantaj Lisbonanoj -

tiel oni festas en Alfama ekde junio. La sanktulo, naskita en Alfama, estis la filo de la malgranda nobelulo. Renkonto kun la malriĉaj monaĥoj de St. Francisko faris al li tiel grandan impreson, ke li decidis aliĝi al iliaj vicoj. Li estis misiisto en Maroko, preleganto en la universitatoj de Montpellier kaj Toulouse. Liaj predikoj kaj granda karismo fariĝis monde konataj. Li mortis en Padovo havante nur 36 jarojn. Oni prezentas sanktan Antonion kun la bebo Jesuo en siaj brakoj. Laŭ la legendo malgranda Jesuo montriĝis al li en lia dormo, kisis lin kaj certigis lin pri la granda amo, kiun Dio havas por la sanktulo.

Kun la grupo de samideanoj ni vojaĝis al [Sintra](#) – la ĉarma restadejo de la reĝo, kie kelkaj el ni supreniris tra la verda “ĝangalo” al la [Nacia Palaco de la Roko](#) (port. *Palácio Nacional da Pena*) kaj mi supreniris al situanta ĉe la pinto [Kastelo de Maŭroj](#). Veninte tien surprizis min la blanka flago kun la blua kruco blovanta ĉe la kastelo. Mi longe supreniris tien, sed ĉu eblas, ke mi jam alvenis al Finnlando? Ja, la portugala flago estas ruĝverda! Post reveno al la buso nia ĉiĉeronino klarigis, ke ĉe la kastelo videblis iama flago de Portugalio, kiu aspektis tre simile al la nuntempa finna flago. Por mi tio estis simbola afero ĉar ja la venonta UK okazos en Finnlando!

Portugaloj amas bongustajn desertojn. Dum kelkaj scivolemuloj el nia grupo estis suprenirantaj al la kasteloj ĉe la monto, aliaj ekskursanoj sidis en kafejo, ĉe la malsupro de Sintra, gustumante loke popularan fromaĝan kukon *Queijada*. Laŭforme ĝi similas al [Pastéis de nata](#), tio estas mufinoj kun multe da pudingo, aspergitaj per sukero kaj cinamo, kiujn ni gustumis en la universitata manĝejo en Lisbono. Ili estas konataj ankaŭ kiel [Pastéis de Belém](#), inventitaj antaŭ kelkcent jaroj kaj daŭre bakataj de monaĥinoj el la klostro en la lisbona Belém-kvartalo.

Per buso ni veturis al [Cascais](#) - la urbo de reĝoj kaj fiŝkaptistoj, kie troviĝas [Boca de Inferno](#) (tio estas *Buŝo de Inferno* - alta kaj pitoreska klifo, en kiu la oceana akvo kavigis tunelon kondukantan al la profunda kaverno) kaj la citadelo.

Nia ekskursgrupo vizitis ankaŭ [Cabo da Roca](#) - la plej okcidentan promontoron de la eŭropa kontinento - kie “la tero finiĝas kaj la maro komenciĝas” laŭ la priskribo de la verkisto [Luis de Camoes](#) en la nacia epopeo “*Os Lusíadas*” (verko priskribanta la ekspediciojn kaj geografiajn malkovrojn de portugala maristoj, kiu temas pri la tuta portugala popolo), kies esperanta traduko “[La Luzidoj](#)” aĉetebles en la kongresa libroservo. Legindas ankaŭ verkoj de nuntempaj portugala verkistoj. Pasintjare kun haltigita spiro, mi legis la romanon “Eseo pri blindeco” de Nobelpremiita [José Saramago](#). Por poezio-ŝatantoj oni proponis legi poemojn de [Fernando Pessoa](#), tradukitajn Esperanten.

En la kongresa libroservo mi aĉetis libreton *Iam en Portugalio*, kiu enhavas mallongajn tamen interesajn rakontojn pri la portugala herooj, kies nomojn portas placoj, stratoj, metrostacioj kaj aliaj objektoj en la urbo. Ekzemple la metrostacio de la kavaliro *Martin Moniz*, troviĝanta proksime al la teatro *Coliseu dos Recreios*, kie okazis la

solena malfermo de la kongreso. Li signife helpis regajni mezepoke okupatan Lisbonon brave tenante malfermitan pordegon dum atako sed perdis sian vivon tiam. En tiu libro oni priskribis multajn historiojn de personoj, kies esakterordinaran agadon oni prilaŭdas en Portugalio.

Verkis: Adam Wilkus